



PILO-PRESS

Internacia

Informservo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 3/1974 - 18 jan 1974
Aperas ĉiusemajne

Wo kann ich Esperanto lernen?

Hallo BRAVO! Unser Lateinlehrer hat uns von einer Sprache erzählt, die in keinem bestimmten Land, aber trotzdem von vielen Menschen gesprochen wird, nämlich Esperanto. Könnt Ihr mir sagen, wo man diese Sprache erlernen kann?

Petra A. aus Mayen

Liebe Petra! Diese Kunstsprache, die der polnische Arzt Ludwig Zamenhof 1887 aus den bekanntesten Kultursprachen gebildet hat, war als „Welt-Hilfssprache“ gedacht, mit der man sich in jedem Land verständigen kann. – In allen größeren deutschen Städten gibt es „Esperanto-Clubs“, in denen man Kurse belegen kann. Es gibt aber auch ein Buch, mit dessen Hilfe man sich diese Sprache selber beibringen kann. Es heißt: „Wir wollen Esperanto lernen“. Preis: Fünf Mark. Zu erhalten bei der „Esperanto Vereinsdruckerei“, 625 Limburg a. d. Lahn, Dietzerstraße 17-19. – Also dann: Viel Vergnügen!

de la 17an de januaro 1974 en kunlaboro kun Aŭstria Esperantista Federacio televidan raporton pri "Esperanto en lernejoj", je la 20,05 horo en la rubriko "Bildung aktuell" (Klerigo aktuale).

Ĉu rekorda aliĝo al UK Hamburgo?

Jus aperis la 4a Oficiala Komuniko pri la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo 1974, el kiu ni citas jenajn informojn:

Aktuala ĉeftemo elektita

La ĉeftemo de la 59a UK estos: "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempo". Ĝi estos traktita unuavice en la Dua Ĝenerala Kunveno de UEA.

La Barbiro el Sofio

En Hamburgo la kongresanoj povos ĝui teatron vesperon, en kiu bulgara trupo el Sofio prezentos francan komedion. Bulgara Esperanto-Teatro konsistanta el renomaj kaj premitaj bulgaraj aktoroj kaj internacie jam konataj pro la prezentoj interalie en Vieno kaj Londono, surscenigos la komedion de Beaumarchais "La Barbiro de Sevilla" (1775), el kiu Rossini faris la samtitolan operon.

Aliĝado kontentiga. Ĝis la 10a de januaro 1974 aliĝis jam 911 personoj. Kompare de tiu nombro kun samdataj nombroj en aliaj jaroj montras, ke la 59a UK havas ŝancon esti la plej granda okcident-eŭropa kongreso de Esperanto en la lastaj 10 jaroj.



Interesiĝo por Esperanto

Nürnberg (pp) La germana junulara revuo BRAVO, la plej granda junulara revuo en la mondo en eldonkvanto de 1 miliono da ekzempleroj, publikigis respondon al la demando de legantino, kie ŝi povas lerni Esperanton. La redakcio publikigis la adreson de la E-eldonejo Limburger Vereinsdruckerei, kiu eldonas la lernolibron "Wir lernen Esperanto", en n-ro 2/1974 de la 3 jan 1974. Laŭ la informo de la eldonejo jam pli ol 70 personoj mendis la lernolibron "Wir lernen Esperanto". Kelkaj aliaj personoj petis pliajn informojn pri Esperanto, kiujn sendis Inform-Centro Esperanto Nürnberg. Vidu la maldekstran germanlingvan tekston!

Televida elsendo en Aŭstrio

Vieno. (pp) La Aŭstria Televido prezentis jaŭ-

Diskuto pri lingva imperiismo

Kassel (FRG) Kadre de la 17a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, okazinta en Zierenberg apud Kassel dum ĉirkaŭsilvestraj tagoj, Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO (KER) organizis seminarion pri "Estonteco de Eŭropaj Lingvoj kaj Kulturo". La seminario estis subtenata kaj subvenciata de Eŭropa Junulara Fonduso. Ĝin partoprenis sesdeko da esperantistoj kaj reprezentantoj de neesperantistaj junularaj organizaĵoj.

Kiel labordokumentoj por la Seminario estis disponataj broŝuroj kiujn eldonis KER kaj kiuj prilumas la ĉeftemon de la Seminario de kelkaj flankoj, far profesoroj Jan Knappert, Julius Balbin, Guy Héraud, Giorgio Cardona, far Unio de Afrikaj Studentoj en Eŭropo, kaj far Claude Nourmont. Dum la unuaj tri sesioj de la Seminario, ankaŭ Uwe Joachim Moritz, Maŭro La Torre kaj Claude Nourmont prezentis siajn prelegojn, kiuj estis bazo de vigla kaj interesa diskuto, kiu ne estis nur teoria skizo, sed ankaŭ tute konkreta konatigado pri la situacioj en la landoj de la ĉeestantoj, ĉefe Eŭropaj.

Maŭro La Torre, reprezentanto de COSV, Kunordiga Komitato de Organizaĵoj por Volontula Servo de Italio, prezentis ĝian agadon kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo, ĝiajn ĝisnunajn atingaĵojn kaj planon por la sekvanta jaro. Kiel enkondukon en sian prelegon, La Torre enketis skribe ĉeestantojn pri ilia kono de politiko, literaturo, geografio, lingvoj kaj muziko pri Okcidenta Eŭropo, Orienta Eŭropo, Afriko, Azio, Suda Ameriko, Britio kaj Usono. La enketo estis provoka kaj pruis al la ĉeestantaro ilian eŭrocentremon kaj tute "suprajn" traktadon de "foraj" landoj, eĉ kontinentoj. Malgraŭ la fakto, ke pri Okcidenta Eŭropo kaj Usono oni petis detalajn informojn, kaj pri la aliaj regionoj nur bazajn, la rezultoj de la enketo montris, ke ĉiuj ni daŭre portas restaĵojn de lingva imperiismo en ni mem.

Esperantistoj, konsekvencaj al la Movado kies membroj ili estas, pruis pli grandan interesigon kaj pli bonan konon de ekstereŭropaj regionoj, sed tamen neproporcion al la kono de la propra mondo. Pri Pearl S. Buck oni centprocente sciis; pri Sergius Piasecki aŭdis nur kvin procentoj da enketitoj! Ĉiuj sciis la antaŭnomon de la edzino de Nixon, sed la unuan Ĉinan kvinjaran planon iuj datumis per la jaro, en kiu Popola Respubliko Ĉinio eĉ ne ekzistis, kaj la leĝorganon de Sovetunio konis nur 35 %. Komparante la rezultojn de la enketo prezentita en la esperantista publiko kun tiuj de la neesperantista, precipe evidentiĝis pli bona kono de la unuaj pri la lingva situacio en la mondo. Neesperantistoj montris senesperigan neinteresigon kaj ignoron pri ĉio ĉi. Kvankam kuriozaĵoj abundas, sufiĉas mencii nur unu. La demando tekstis: "En Zairo 1-2 % de la loĝantaro parolas ankaŭ france. Kiu(j)n lingvo(j)n parolas la ceteraj 98% ? Kontrolantoj de la enketo konstatis, ke 35 % en esperantista enketitaro pozitive respondis, sed neesperantista publiko en Torino enketita havis nur 2% da ĝustaj respondoj. Unu el la ceteraj 98 % estis: "Mi ne scias kie estas Zairo, sed se oni tie parolas alian lingvon, ĝi devas esti la angla."

La lastaj du kunvenoj de la partoprenantoj de KER-Seminaro estis dediĉitaj al la difino de estonta agado. Oni plejparte argumentis pri la metodoj kiel interesigi ankaŭ neesperantistojn pri la konsekvencoj de subpremado de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj fare de la grandaj. Tiucele la Komisiono KER de TEJO provos provoki publikan debaton pri la temo inter la fakuloj el diversaj medioj kaj kun malsamaj starpunktoj - tio estus la teoria flanko. Sed oni fiksis ankaŭ konkretajn agadplanojn, i.a. "eltranĉaj-servon" kaj novan Seminarion "Lingvo kaj Socio" ĉi-somere en Münster.

Jelena Arandjelović

Fenduso Olimpiaj Ludoj 1972 Munkene

Financa raporto

Nürnberg (pp) Ĉi-sekve ni publikigas la finanĉan raporton pri la agado ekaze de la Olimpiaj Ludoj en Munkene 1972. Ĝenerala raporto jam aperis en Germana Esperanto-Revue n-ro 6/1972.

Ni dankas al ĉiuj, kiuj subtenis sisteme la agadon kaj speciale la eldonadon de la broŝuro "Saluton amiko", verkita de ambasadoro Ralph Harry. Ni petas pri kompreno, ke ni ne povas publikigi la nomojn de ĉiuj donacintoj, sed devas limigi nin al la publikigo de la nomoj de tiuj personoj aŭ organizaĵoj, kiuj donacis 100 GM aŭ pli. Sed ĉiu donacinte ricevos kopion de ĉi tiu raporte.

Enspezoj

1) Donacoj	
Ambasadoro Ralph Harry, Bonn	460,-- GM
Aŭstralia Esperanto-Asocio + 3 aŭstraliaj esperantistoj	250,-- GM
Germana Esperanto-Asocio	300,-- GM
Esperanto-Klubo Munkene	250,-- GM
Esperanto-Liga Berlin	100,-- GM
Prof. Murath, Karlsruhe	100,-- GM
S-ro Schönrich, Wiesbaden	100,-- GM
S-ro Kaukal, Neustadt/Weinstr.	100,-- GM
S-ro Pickel, Nürnberg	100,-- GM
S-ro Sack, Heidelberg	160,-- GM
Aliaj donacoj sub 100 GM	531,60 GM
	<u>2 451,60 GM</u>
2) 732 venditaj broŝuroj	1 405,-- GM
Sumo de la enspezoj	3 856,60 GM

Elspezoj

1) Broŝuro "Saluton amiko", preseja fakturo	2 908,21 GM
2) Varbilejoj, informiloj, varbado	411,38 GM
3) Afranko	150,-- GM
4) Administraciaj kostoj, inkl. impostoj	436,23 GM
5) Veturkostoj per aŭtomobilo	
4 foje Nürnberg-München-Nürnberg	256,-- GM
Sumo de la elspezoj	4 161,82 GM

=====

Diferenco inter Enspezoj kaj Elspezoj	minus	305,22 GM
---------------------------------------	-------	-----------

=====

Eldonitaj estis 2 000 broŝuroj "Saluton amiko"

Senpage disdonitaj estis 1 038 ekzempleroj

Venditaj estis 732 "

Resta stoko 230 "

Nürnberg, 12 jan 1974

Ludwig Pickel
Ludwig Pickel



IJK-Novaĵoj el Münster

Münster (pp) La 30a Internacia Junulara Konferenco okazonta tuj post la UK en la urbo Münster de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1974 diskutos pri la ĉef-temo "Junularo kaj Edukado" kaj traktos diversajn temojn el la junularpolitika kaj eduka sektoro, i.a. "internacia junulara interŝanĝo", "reformo de altlernejoj", "kontraŭaŭtoritata edukado", "lingvo-instruado" kaj nelaste "la laboro de TEJO". Tiujn temojn traktos parte laborgrupoj, parte enkondukos prelegantoj. Inter la prelegantoj troviĝas i.a. Karl-Heinz Walkhoff, membro de la germana federacia parlamento "Bundestag" kaj d-ro Helmar Frank, profesoro pri cibernetika pedagogio en la altlernejo Paderborn kaj aŭtoro de la konataj "tezoj pri germana lingvopolitiko".

En la kadro de la IJK la komisiono por eksteraj rilatoj (KER) de TEJO aranĝos seminarion "Lingvo kaj Socio", kiu direktas sin ankaŭ al neesperantistoj, ĉefe al reprezentantoj de junularaj organizoj. Por tiu seminario denove estas petata subteno de la Eŭropa Junulara Fonduso.

Bone funkcias la aliĝado; intertempe sin anoncis kvindekda personoj el 16 landoj. Unuafoje en "okcidenta" IJK partoprenos ankaŭ delegacio el Soveta Unio.

La lokaj preparantoj konsilas laŭeble frue aliĝi, ĉar la loĝigaj ebloj estas limigitaj. Petu aliĝilon de 30a Internacia Junulara Konferenco, p.a. Gisela Jungkamp, D-44 Münster, Mondstr. 3, FRG

La semajno en la radio (pp)

Al la hodiaŭa eldono de Pilo-Press estas aldonita speciala eldono pri la Esperanto-elsendoj. Pilo-Press intencas regule eldoni tiajn radiajn foliojn, por popularigi la Esperanto-elsendojn. -

Pekino. Post kelkaj semajnoj de neaŭdo la Pekinajn elsendojn mi aŭdis sabate, la 12 jan, je la 21a horo, klare kaj senĝene sur ondo 31 m. Anonco pri la Esperanto-elsendoj el Pekino troviĝas en n-ro 1/1974 de El Popola Ĉinio. Post la ĉiniaj novaĵoj aŭdiĝis ĉinlingvaj kantoj honore al Maŭ Zedong.

Berno Tiun stacion mi regule aŭskultas sur ondolongo 48,66 m kun ĉiam bona rezulto, je la 13,20 h. D-ro A. Baur daŭrigis sian prelegon pri la alpoj kaj ge-sroj Gacond la preparolon de la enketado pri la junularo, ĉi-foje la junulara sinteno al sporto, hobbio kaj kulturo.

Romo. La Romaj E-elsendoj ŝajne devas momente batali kontraŭ rumana stacio, kiu ĝenas ilin. Tamen el la etera bruo mi povis konstati, ke la Esperanto-Kuriero raportis pri iom malnoviĝintaj aferoj, pri la Filatela Ekspozicio en Poznan en aŭgusto 1973 kaj pri la apero de la hungara Esperanto-Magazin.

Varsovio. La ĉi-foja Esperanto-Ekspresso atingis laŭ mia opinio sian kutiman aktualan informan nivelon. Prave en komentario M. Dastych opinis ke la Esperanto-Ekspresso ne povas ĉerpi siajn informojn el la E-gazetoj, la ordinaraĵ "trajnoj". Jen la unuopaj Ekspres-eroj: Raporto pri la plenkunsido de la ĉefa estraro de PEA; Novaĵoj de Pilo-Press; Intervjuo kun reprezentanto de Juventur kaj Monda Turismo pri turisma protokolo kun Hungara E-Asocio; Muziko el "Grafino Maritza" k.a.